

# INTERNACIA



# JURNALISTO

ORGANO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA (ASOCIO)

## SUKCESA JARKUNVENO DE T. E. J. A. EN LONDONO

En la kadroj de la 56-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta ĉi jare en Londono — la grandega, bela kaj interesa de historia, kultura, politika kaj ekonomia vidpunktoj ĉefurbo de Britlando — sukcese okazis ankaŭ la Jarkunveno de nia Tumonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.

Al la Universala Kongreso aliĝis 2065 esperantistoj el 40 landoj. Inter ili estis sufiĉe da partoprenantoj-ĵurnalistoj, multaj el kiuj estis okupitaj en aliaj kongresaj kunvenoj, kunsidoj ktp. Pro tio la jarkunvenon de TEĴA ĉeestis 23 ĵurnalistoj el 13 landoj, inkluzive la japana f-ino Akiko Nagata, kiel reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio. Reprezentanto de la Pola Radio estis s-ano Marius Dastyĉ el Varsovio.

Ĉeestis ankaŭ la konstanta gvidanto de la Gazetara Servo ĉe Universala Kongresoj — nia jugoslava kolego kaj amiko Marinko Ĝivoje.

Kiel ni mencias aliloke, pri la bona preparo kaj sukcesa laboro de nia jara kunveno anticipe kaj aktive agadis niaj londonaj tefanoj kaj precipe s-ano A. W. Thomson (Avoto). Ili preparis kaj sendis specialan alvokon, engaĝis salonon k. a.

La kunvenon malfermis per salutaj vortoj nia prezidanto longjara s-ano Olav Thormodsen. Li samtempe invitis ĉiujn

partoprenantojn al fruktodona traktado de niaj TEĴA — problemoj.

Kiel protokolisto funkciis s-ano A. W. Thomsom (Avoto).

Kiel informas la redakcion de „I. J.“, la protokolisto Avoto — „la kunveno estis interesa, serioza kaj entuziasma, do espereble, fruktodona, kaj mi persone tre ĝuis la interkonatiĝon kun aliaj TEĴA-anoj“.

En la centro de la diskutoj kaj eldiroj estis la preparita de la anglaj kolegoj projekto de Statuto, kopto de kiu estis disdonita anticipe al ĉiuj ĉeestantoj. Post la mallonga raporto de prezidanto Thormodsen, tiu punkto estis la plej grava. La lasta punkto de la tagordo estis — elekto de nova Estraro de TEĴA.

Post la detala diskutado oni unuanime decidis rekomendi la statuton al la membraro de TEĴA kun jenaj aldonoj:

II. Celoj. „7. Protekti la profesiajn interesojn de la membroj“.

V. Reprezentantoj. Aldonu: „La landaj reprezentantoj konsistigas Komitaton, kiu asistas la Estraron“.

VII. Servoj. Unua linio, anstataŭ „duspecaj“ legu „trispcaj“.

Aldonu „3. Konsila Servo. Klameble kaj oportune, aprobitaj profesiaj membroj povas konsili aspirantojn kaj nespetulojn pri ĵurnalista metio.“

Tiuj sugestoj venis precipe de s-ano Oc-

key. Aliaj komentoj dum la diskuto inkluzivis:

1. Ke-balotiloj estu presataj sur la paĝoj de „IJ“ (ĉar oni difektus ĝin per forŝiro), sed sur apartaj folioj, enmetotaj inter la paĝoj. Kaj —

2. Ke oni ne difinu la asocian abonkoton (membrokotizon) per statuto, ĉar la Estraro rajtos ŝanĝi ĝin por sekvanta jaro se necese, sen balota sankcio.

Oni antaŭvidis baldatuan altiĝon de la kotizo (pro nuna deficitio) kaj iu sugestis eĉ ĝis 2 dolaroj. Sed s-ano Aleksiev el Sofio konsilis, ke oni estu tre singardema pri tio, ĉar troa altiĝo de la kotizo povus bremsi varbadon de membroj kaj eble provoki eksiĝojn. (Kompreneble filiaj kotizoj devas inkluzivi pluan sumon por filia administrado). Iu ankaŭ petis, ke oni refunkciigu la sistemon de gunitaj datslipoj, por alglui ilin sur la dorson de la membrokarto kiel ĉiujrajaj kvitancoj. Nur tiel oni povas legitimi la ĝisdatan membrecon de la posedanto de la membro karto. S-ano Ĝivoje petis, ke TEJA konsideru kunlaboradon kun la kongresa Gazetara Servo, kaj ĉiuj aprobis la proponon.

Unuanime la partoprenintoj elektis novan Estraron de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio por la jaro 1971—72:

Prezidanto — Olav Thormodsen, Norvegio.

Vicprezidantoj (alfabete) Ivan Keremidiev—Esperov, samtempe kasisto por Oriento kaj ĉefredaktoro de „Internacia Journalisto“, Bulgario.

Nikolao F. Danovskij, Sovetio.

Tadros Megalli, Egiptio.

Sekretario-kasisto — d-ro Dino Fabris, Italio.

Estraranoj: (alfabete): A. W. Shomson, d-ro A. Mildwulf (ambaŭ el Britlando) kaj Emil Mayer, Pollando.

S-ano Avoto raportas, ke la brita filio havas du novajn pagilajn membrojn (do entute 9):

S-ro H. B. Franks, 11, Victoria Avenue,

Ore, Hastings, Sussex, Anglio.

S-ino Z. J. Sotiraki, 109, Shepherds Bush Road, Brook Green, London, W. 6, Anglio.

(Ambaŭ amatoraj membroj)

Rilate al la Jarkunveno en 1972 s-ano Avoto proponas la jenon: Oni konjektas, ke kiam la Universala Kongreso de Esperanto 1972 okazos en USONO, certe la Universala Esperanto-Asocio aranĝos Eŭropan E-Konferencon en tiu-eŭropa lando, kiel oni faris en 1965. (Tiam ta UK okazis en Japanio). Do, nia Jarkunveno povas okazi samtempe kaj samloke kun la Konferenco de UEA.

La Estraro de TEJA pritraktos la proponon de s-ano Avoto kaj decidus kaj tuj avertos la membraron de nia Asocio.

S-ano Avoto ankaŭ preferas, kiel aliaj britaj membroj, ke ni devas sekvi la ekzemplon de UEA Jarlibro, uzante ĉiam la fundamentajn formojn de landnomoj. Tion rekomendas ankaŭ la Komisiono por Ordigo de geografiaj nomoj.

La redakcio de „Internacia Journalisto“ dankas la proponon. Post pridiskuto de la demando, eble, ekde la nova 1972, ankaŭ ni uzos la fundamentajn formojn de landnomoj.

Do, karaj membroj de TEJA! Ni esperu, ke post la fruktodona Jarkunveno de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio en Londono, post la kompletigo de nia Estraro kaj post la pridiskuto kaj aprobo de la nova Statuto, niaj Asociaj aferoj ekmarŝos rapide antaŭen.

Ni ne nur esperu, sed energie subtenu la novan Estraron por plenumo de ĉiuj starigitaj antaŭ TEJA taskoj. Al aktiva laboro ankaŭ kiel kunlaborantoj de nia kara asocia organo „Internacia Journalisto“! Ni konstante kontribuu al ĝi variajn pri-jurnalismajn materialojn, artikolojn, informojn, fotojn, raportiaĵojn, eseojn, ŝanĝon de opinioj kaj sperto ktp.

Al novaj sukcesoj!

## PROpono POR NOVA STATUTO

Karaj Kolegoj,

Kredante, ke multaj esperantistaj fakasocioj ne estas, en tiu ĉi moderna mondo, tiel efikaj kiel ili meritas, ĉar iliaj organizo kaj metodoj estas ne plu aktualaj, mi sugestas, ke ni en TEJA povus utile okupi nin per rerigado al niaj statutoj kaj, se eble, reorienti ilin en la direkton de pli dinamika progreso. Mi tial kunmetis „skizan“

statutaron, kiu ne pretendas esti finpréta modelo, sed servos kiel bazo por diskutado dum la Jarkunveno, kiu espereble okazos dum la Londona UK en 1971. Mi esperas, ke la Estraro, post la diskutado, povus elabori pli perfektan kadron de reguloj, pri kiuj la membraro balotos antaŭ la Jarkunveno 1972.

Avoto

# Pri nia statuto

## LA MALNOVA STATUTO

### 1. NOMO KAJ SIDEJO

Nomo de la Asocio estas: Tutmonda Esperantista Journalista Asocio, mallonge TEJA. La sidejo de la Asocio estas fiksita laŭ la sidejo de la Centra Estraro.

### 2. CELOJ DE LA ASOCIO

La celoj de TEJA estas kunigi ĉiujn jurnalistojn, kiuj scipovas Esperanton, por komuna kunlaboro kaj kunhelpo rilate la korespondadon, intersanĝon de artikoloj, enketoj, informoj pri diversaj demandoj. Per uzado de Esperanto inter jurnalistoj pruvi, ke la lingvo devas servi al praktikaj celoj. Organizi fakajn kongresojn dum internaciaj kongresoj de UEA, SAT ktp. kaj arangii renkonton inter diverslandaj jurnalistoj, kiam ili vojaĝas, kaj helpi al ili.

### 3. ENSPEZOJ DE LA ASOCIO

Por povi realigi supre nomitajn celojn la Asocio ricevas monon per kotizoj.

### 4. MEMBRECO

La membroj konsistas el du kategorioj: A-kaj B-membroj.

A — membro estas ĉiu jurnalista, kiu apartenas al sialanda profesia asocio aŭ kiu sin vivtenas per jurnalismo kaj verkado, radio-jurnalistoj kaj kunlaborantoj en radio.

B — membro estas tiu, kiu pli malpli okaze kunlaboras en diversaj gazetoj, verkistoj kaj redaktoroj de esperantaj ĵurnaloj, neprofesiaj radio-kunlaborantoj.

La Centra Estraro rajtas eksigi membron, se tiu agas kontraŭ la celoj de la Asocio aŭ faras nesolidarecajn agojn. Eksigita membro povas apelaci al okazonta kongreso pere de Centra Estraro kaj fine, se ekzistas diversaj opinioj, voĉdonado fiksas decidon pri la demando.

### 5. GVIDADO DE LA ASOCIO

Organoj de la Asocio estas: la fak-kongreso, voĉdonado kaj Centra Estraro.

La elektita Estraro decidas inter la voĉdonadoj. Ĝi konsistas el Prezidanto, Sekretario, Kasisto, Viceprezidanto, Vicesekretario kaj du membroj konsilantoj. Estas dezirinde, ke la Estraranoj loĝu en la sama lando aŭ inter si proksimaj landoj.

Krome por ĉiu lando estu peranto (representanto). Se pluraj membroj estas en sama lando, ili kune elektas aŭ proponas reprezentanton, alie la Estraro proponas.

### 6. CENTRA ESTRARO

Ĉiun trian jaron okazas elekto de Centra estraro. La fakaj kongresoj dum la elektojaro proponas estrarajn kandidatojn, sed povas partopreni nur membroj, kiuj pagis samjaran kotizon kaj estas elektata la Estraro per voĉdonado.

Se estas diversaj proponoj aŭ diskutoj pri kandidatoj, la Estraro post la elektado voĉdona donu al ĉiuj membroj raporton pri la voĉdono, kiu klare montras kiel ĉiu ano voĉdonis por ke la kontrolo estu efektiva.

## PROEKTO-STATUTO

### I.

NOMO. La nomo de la Asocio estas Tutmonda Esperantista Journalista Asocio, mallongigita iniciale per TEJA.

### II.

CELOJ. La ĉefaj celoj de la Asocio estas:

1) Interrilatiigi, per la internacia lingvo Esperanto, diverslingvajn Journalistojn, redakcianojn kaj verkantojn de periodaĵoj en iu ajn lingvo.

2) Organizi la provizadon kaj intersanĝon de verkita materialo, originala kaj tradukita, por naciaj kaj internaciaj periodaĵoj.

3) Eldoni propran organon kaj laŭbezone aliajn presaĵojn.

4) Starigi kaj funkciigi, por profitigi la Asocion, tradukan servon por ĉiaj klientoj, ĉu esperantistoj aŭ ne.

5) Reprezenti la ĵurnalistan profesion ĉe konferencoj, kongresoj kaj aliaj kunsidoj.

6) Stimuli edukadon kaj ekzercadon pri internacia ĵurnalismo.

7) Protekti la profesiajn interesojn de la membroj.

### III.

MEMBROJ. Rajtas esti membro de TEJA iu, kiu okupas sin pri redaktado, kontribuado aŭ kompilado de perioda literaturo, ĉu profesie (tute aŭ parte salajrita), ĉu amatore (kun aŭ sen kompenco). En la matrikulo oni distingas inter tiuj du kategorioj per la literoj P (profesia) kaj A (amatora).

### IV.

ESTRARO. La estraranoj estas elektatas perpoŝta baloto de ĉiuj asocianoj. En okazo de egaleco, la reganta prezidanto havos duan voĉon, escepte kiam temas pri lia propra ofico, kiun same decidis la viceprezidantoj.

La estraro konsistas el:

1) Prezidanto, oficanta tri jarojn.

2) Tri viceprezidantoj, elektataj po unu ĉiujare por tri jaroj (la komenca vico estu alfabetaj).

3) Du kasistoj (Orienta kaj Okcidenta), oficantaj tri jarojn.

4) Interna Sekretario (same), kiu zozgos protokolojn, matrikulon kaj ĝeneralan administradon de la Asocio.

5) Ekstera Sekretario (same), kiu zozgos kontraktajn kaj aliajn rilatojn kun klientoj.

6) Redaktoro (same), kiu prizorgos la organon kaj bultenojn de la Asocio.

7) Naŭ Komitatoj, elektataj po tri ĉiujare por tri jaroj (la komenca vico estu alfabetaj). Iuj du asocianoj povas proponi kandidaton por iu ajn ofico, sed devas kunsendi al la Interna Sekretario ties skribitan konsenton almenaŭ du monatojn antaŭ la Jarkunveno. Ĉiuj estraraj oficoj validos ekde la fino de la Jarkunveno, kiu kontrolas kaj konfirmas la baloton.

### V.

REPREZENTANTOJ. En ĉiu lando la estraro povas nomi unu konsentintan membron Landa Reprezentanto, inter kies funkcioj estos: kolekti kaj transpagi kotizojn de samlandanoj, disdoni la organon kaj aliajn oficialaĵojn en sia lando, varbi novajn membrojn kaj — se eble — organizi filion. La landaj reprezentantoj konsistigas Komitaton, kiu asistas la Estraron.

La fakaj kongresoj ankaŭ proponas revizorojn, kiuj, se eble, loĝu en la sama lando, kie estas la estrara sidejo.

Por la sama tempo oni elektas ankaŭ anstataŭantojn de la estraranoj kaj revizoroj.

Inter kongresoj la Estraro decidis, sed la fakaj kongresoj povas plendi aŭ fari proponojn pri ŝanĝoj kaj decidoj.

Se temas pri gravaj demandoj, oni uzas voĉdonadon ĝeneralan, en kiu partoprenas nur regulaj membroj, pagintaj la membrotizon.

Post la faka kongreso la Estraro devas kiel eble plej baldaŭ sendi la proponojn al la membroj, samtempe oni fiksas la daton por la fina voĉdonado. Por esti validaj la voĉoj devas esti en la manoj de la Estraro plej malfrue duonjaron post la kongreso se la faka kongreso okazos dum aŭgusto kaj oni proponas Estraron, tiam, la balotado devas esti finita la 31-an de januaro venontan jaron kaj dum februaro samjare la Estraro devas konigi al la membroj la rezulton. La forirantaj postenhavantoj, se eble, devas transdoni siajn postenojn al la novelektitaj estraranoj la unuan de marto saman jaron.

## 7. TASKOJ DE LA ESTRARO ESTAS

Efektivigo de la kongresaj decidoj kaj decidoj faritaj per voĉdonado, labori por realigo de la asociaj celoj, kunvoki la fakajn kongresojn kaj en la sekretariejo konservi liston de ĉiuj partoprenantaj membroj, sufiĉe frue konigi al la aliĝintoj la nomaron de partoprenantoj, sendi al fakaj kongresoj koncernajn proponojn kaj prepari tagordon por tiuj, kiuj prizorgos la aranĝojn de la faka kongreso, se la Estraro estas malhelpata mem partopreni, kontinue sendi al la membroj liston pri novalektitaj membroj, respondi al la demandoj de anoj kaj esperantistoj — ĵurnalistoj.

Ŝanĝoj de tiuj statutoj povas okazi nur ĉe faka kongreso aŭ per referendumo.

Rimarko de la redakcio. En la jarkunveno de TEJA kiu okazis en la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto oni faris iujn negrandajn ŝanĝojn en la Statuto. Oni decidis, ke :

a) la vicprezidantoj de TEJA estu tri personoj;

b) krom ĝenerala sekretario-kasisto estu ankaŭ kasisto por orientaj landoj (kiun taskon plenumas la redaktoro de „Internacia ĵurnalistoj“ por kolekti monon pri la eldonado de nia organo);

c) nia supera gvidorgano estu la ĝenerala jarkunveno de TEJA, ĉar TEJA malfacile povas kunvoki kongreson;

d) en ĉiu lando, kie estas pli ol kvin membroj de la Asocio oni povas organizi sekciojn de TEJA.

e) la kolektata membrotizo en ĉiuj landoj, post la deteno de necesaj kancelariaj elspezoj de grupoj, sekcioj (filioj), estu sendata al la redakcio de „Int. J-sto“, ĉar la gazeto estas ekspedata al ĉiuj membroj „senpage“ (la membrotizo inkluzivas ankaŭ la abonkoton);

f) la ĝenerala sekretario detenas ĉe si monon nur por pago de kotizo al Universala Esperanto-Asocio kaj por kancelariaj elspezoj. La restanta sumo li sendas al la redakcio por eldon-kaj ekspedelspezoj de la organo.

## VI.

FILIOJ. En ĉiu lando, kie troviĝas almenaŭ dek membroj, oni rajtas starigi Landan Filion. Filioj estos administre kaj finance aŭtonomaj, sed dum ĉiu januaro ili devas sendi al la koncerna asocia kasisto la abonkotojn de la nova jaro kaj kopion de la filia bilanco de la antaŭa jarkon. Filio normale havos tri oficistojn: Prezidantoj Sekretarion (ordinare la Landa Reprezentanto) kaj Kasiston. La Prezidanto kaj la Kasisto estos balote elektataj de la filianoj por tri jaroj; la sekretario ofice estos ĉiam je dispono de la asocia estraro, kaj en filioj kun almenaŭ 40 membroj povas esti disigitaj en du fakojn — internan kaj eksteran (vidu IV, 4, 5). En tiuj landoj, nefilianoj devos trakti rekte kun koncernaj estraranoj.

## VII.

SERVOJ. La ĉefaj servoj de la Asocio estas trispacaj:

1) Informa Servo. Temas pri mallongaj raportoj pri aferoj aktuale interesaj al la publiko, citaĵoj el nacilingvaj periodaĵoj aŭ brodkastoj, novaĵoj pri leĝoj, impostoj, internaciaj rilatoj, katastrofoj, sportoj, epidemioj, malakordoj, nekrologoj, inventaĵoj, artmondaj eventoj ktp.

2) Traduka Servo. Kiam kliento (sciencisto universitato, komerca firma, reserĉisto ktp.) mendas nacilingvan tradukon de iu letero, artikolo aŭ alia verkaĵo aperinta aliande, la filia sekretario peras la mendon al la filio de la koncerna lando, kiu provizas esperantan tradukon. Tiur ĉi la filia sekretario tradukas nacilingven por la kliento.

Por tiuj servoj TEJA povas postuli pagon, el kiu la asocia kaso ricevos 20%, la filia kaso 40% kaj la verkinta asocio 40%. Por negliano la asigno estos 50% al la asocia kaso kaj 50% al la verkinto.

3. Konsila servo. Kiam eble kaj oportune aprobitaj profesiaj membroj povas konsili aspirantojn kaj nespartulojn pri ĵurnalista metio.

## VIII.

KUNVENOJ. Ordinare la aferoj de la Asocio (inkluzive je balotoj) plenumiĝos poste kaj bezonas maksimuman akuratecon, sed la Jarkunveno okazos en la kadro de la Universala Kongreso, kondiĉe ke kvorumo de sep membroj ĉeestas. Sen kvorumo oni devas agi poste kaj per la organo. La Jarkunvenon prezidas la plej supera ĉeestanta estrarano, laŭ precedenco en regulo 4. Ĉiuj gravaj decidoj pri asocia organizo kaj proceduro bezonas ĝian konfirmon per simpla plimulto da voĉoj, kaj en okazoj de egaligo la prezida oficisto havas duan voĉon.

## IX.

VALIDIGO. Tiu ĉi statutaro estos efektiva nur post simpla plimulto da ricevitaĵ balotiloj kaj konfirmo de sekvanta Jarkunveno, laŭ la regulo

## X.

AMENDOJ. Ĉiu asocio rajtas proponi aldonojn, forstrekojn, modifojn aŭ aliajn amendojn al la statutaro, kiuj devas atingi la Internan Sekretarion almenaŭ du monatojn antaŭ la Jarkunveno, kaj bezonas la sankcion postulatan en regulo IX antaŭ ol validiĝi.



## STREĈITA KORDO

*Streĉita kordo! Ĝojo kaj lamento  
Vibrigis vin. Sed ili al la brust'  
Delonge fremdas kaj indiferento  
Jam kovras ilin per dikpolva krust'.  
Kordo, vi longe kuŝis en silento,  
Jam eble vi eĉ raiŭkas pro la rus' . . .  
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,  
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.*

*Malnovaj kantoj! Ho, ĉu estas ili  
La miaj do? Mi ja ne scias mem.  
Ĉu sentojn tiel povis min ekzili,  
Ke min ne tuŝas jam ilia trem'?  
Ĉu tiel povas mi min malsimili,  
Ke, sen kompren' mi miras pri poem',  
Kiun mi kantis iam larme, sange?  
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.*

\* \* \*

*La fremdiĝinta tinto de liuto  
Kun ĉiu sia tikla rim'*

*El ĝena troproksim', per vasta ŝuto,  
Forflugu al la fremda malproksim',  
La kantojn, kiuj premis min per mutoj,  
Mi fine ĵetu jam el la anim',  
Kiel balaston ĵetas la balono,  
Por flugi al pli alta regiono,*

K. Kalocsay

## KALOMANO KALOCSAY—PRIMEMORO NASKIĜTAGA

*„ . . . Preskaŭ 60 jaroj per si mem pruvas la sindonan fidelecon al nia „afero“, sed tiu altkvalita multfaceta laboro, la eksterordinare riĉa produktaĵo dum pli ol duonjarcento donas al ni rajton meti lin inter la korifeojn de la klasika periodo de nia lingvo. Laŭ lia akademiano-kunulo Ludoviko Tarkony, la loko de nia veterano estas” senpere apud Zamenhof, Grabovski kaj Kabe . . .”*

*„ . . . Mirinda estas la fekundeco, la kreoscio, la konstanta verkademo de nia festito. Pli ol 20 libroj enhave kaj stile valoraj, atrikoloj ne kalkuleblaj en la E-gazetaro pri variaj temoj pripensigaj kaj instrudonaj estas nur kvanta karakterizaĵo de signifo sekundara . . .”*

*„ . . . Lian laboron karakterizas la fervoro. Jes, la fervoro. Kion diris Kalocsay en 1937, okaze de la 50-jara datreveno de la Esp-movado? Interŝajute pri la estonteco de Esperanto en la sekvaj 50 jaroj, il diris interalie:*

*„ . . . Ni havas rajton je belaj esperoj. Tamen nura espero ne tro helpas, la ironio de la lingvo rimigas ĝin kun vespero. Ni serĉu vorton, kiu rimas kun aŭroro!*

*Ĝi estas — „fervoro!“*

*El „Hung. E-sto“ okt. 1971*

*La redakcio de „Internacia Jurnalistoj“ tutkore kaj frate salutas nian amatan kolegon — grandan Esperanto-poeton kaj fervoran esperantiston Kalomano Kalocsay kaj vame gratulas lin okaze de la 80-a datreveno de lia naskiĝo!*

ĈIU nepre konsentos ke, en la longa batalado por diskonigi la Internacian Lingvon, unu el la plir potencaj armiloj estas la presita vorto.

La legantoj de la mondo konsumas en ĉiu tago centojn da tunoj da libroj, ĵurnaloj, gazetoj, revuoj, raportoj, flugfolioj kaj aliaj presajoj. Sed kion ofte ili legas ion pri Esperanto?

TEJA fondiĝis en 1948, celante organizi niajn ĵurnalistojn, redaktorojn kaj verkantojn kaj ordigi ilian servadon al nia movado. En kelkaj landoj, precipe en Orienta Eŭropo, ĝi gajnis membrojn kaj subtenadon, sed ĝenerale ĝi estas ankoraŭ malforta kaj ne eflike koherigita, kaj mankas al ĝi sistema direktivo.

Temas ne nur pri propagandaj artikoloj en nacilingvaj organoj, nek nur pri literaturajoj en esperantaj gazetoj, sed pri tia ampleksa, akurata kaj fidinda informservo al la tutmonda publikistaro, kiu konvinkos la publikon, ke nia lingvo estas valora kaj uzenda rimedo por pli kompleta disvastigo de ideoj.

Tiu koncepto necesigas kompetentan organizon, kun branĉoj aŭ filioj en multaj landoj, por verki, traduki kaj intersangi informojn pri ĉiaj temoj.

Britujo estas unu el la landoj, kie tia branĉo ankoraŭ ne ekzistas, do la brita voĉo malofte aŭdiĝas en lokoj, kie la brita vidpunkto estas tro ofte miskomprenata. Unuflankaj argumentoj fruktas magre; ju pli intime oni komprenas, des pli inklina oni toleras — kaj amikiĝas.

Estas evidente, ke aktiva filio de TEJA estus valora rado en la informa maŝino kaj antaŭi pli ol unu jaro mi proponis min kiel provizoran peranton de TEJA, ĝis kiam fondota filio povus elekti profesian ĵurnaliston, aŭ alian kompetentan samideanon, kiel sekretarion. Mi estis tuj akceptita.

De la komenco mi danke ricevis fortan apogon kaj utilan konsilon de la sperta d-ro A. Mildwurf, kaj ni kune konsentis, ke stabila filio bezonos almenaŭ 10—12 membrojn. Sekvis abunda korespondado kaj alvokoj al skribemuloj. Ni provi-

zore decidis, ke la filio bezonos minimume tri oficistojn — prezidanton, sekretario kaj kasisto — ankaŭ por pagi la TE.A-n jarkotizon (1 usona dolaro) kaj la administrajn elspezojn (afrankoj ktp.), ni devus postuli nur 75 novaĵn pencojn de ĉiu filiano.

Ĝis nun ni varbis nur kvin aliajn membrojn, de la fondontoj de la brita filio (en alfabeto ordo) estas aktuale jenaj: —

FIELDING, s-ro C.; 1, Church Road, Horfield, BRISTOL 7.

MAITLAND, s-ro F.; Braeside, Kenardington, ASHFORD, Kent.

MILDWURF, d-ro A.; 71, Compayne Gardens LONDON, NW6 3RS.

OCKEY, s-ro E.; 15, Upper Pines, Woodmansterne, CANSTEAD, Surrey.

RAZZELL, s-ino N. M.; 8, The Drove, BRIGHTON, BN1 5NN, Sussex.

RYTJKOV, s-ro N.; ĉe London Esperanto Club, Eret Tallant Hall, 153, Drummond St., LONDON, NW1.

THOMSON, s-ro A. W.; 315, Bellegrave Road, WELLING, Kent.

ĈU VI SKRIBAS? — Jes? Do vi kapblas helpi! Pri iuj temoj vi nepre posedas sciojn kaj opiniojn. Utiligu ilin por Esperanto! Komuniku senprokraste al mi — A. W. Thomson (Avoto) — adreso supre.

ORGANO DE TEJA. — Ĉiu kotizinta TEJA-ano ricevas sen plua pago la gazeton de la asocio — INTERNACIA JURNALISTO.

LA LONDONA KONGRESO. — Mi klopodas aranĝi fakkunvenon por TEJA dum la Universala Kongreso en Londono (31/7—7/8/71). Detalojn mi anoncos en sekvanta bulteno. Ĉiuj ĵurnalistoj, redaktoroj kaj verkantoj (cu profesiaj, cu amatoraj), ankaŭ interesataj kongresanoj, estas kore invitataj.

DONACIOJ. — Ni dankos donacojn de iu ajn por la kostoj (presado, reklamo ktp.) de nia iniciatita kampanjo. Oni pagi ĉekojn kaj poŝtmandatojn al „Brita Filio de TEJA“.

Represo, futa aŭ parta,

permesata — eĉ petata.

„I. J.“ aperigas la cirkuleron de la brita filio, kiun oni dissendis al ĵurnalistoj

## ANIAJ KOLEGOJ EN ANGLIO AKTIVAS

*Kiel ni informis en la pasinta n-ro de „I. J.“, en Anglio kelkaj kolegoj bone aktiviĝis, ekagante fondi Filion de TEJA en sia lando. En la centro de tiu aktiveco kaj iniciatanto estas nia teĵano A. W. Thomson (AVOTO). Li ekfunkciis kiel provizora brita reprezentanto de TEJA. S-ano AVOTO, kun la helpo de kolego Mildwurf kaj aliaj kolegoj prizorgis ne nur la starigon de la EILIO, sed ankaŭ prizorgis la antaŭpreparan laboron por la bona organizado kaj preparo de la Jarkunveno de TEJA en la kadroj de la Universala Kongreso de Esperanto en Londono ĉi jare.*

*Samtempe s-ano AVOTO ellaboris Projekton de Statuto por TEJA. Ĉar nia Aso-*

*cio jam havis Statuton, kiun s-ano AVOTO ne konis, laŭ la decido de la Jarkunveno de TEJA en Londono, en la nuna n-ro de „Internacia Ĵurnalistoj“ ni aperigas la Projekton de AVOTO. Ĉiu kolego teĵano povas kompari la malnovan Statuton kun la Projekto de AVOTO, forstreki aŭ aldoni ion novan kaj sendi siajn opiniojn kaj rekomendojn al la Ĝenerala sekretario de TEJA aŭ al redakcio de „I. J.“* lujn proponojn ni povus aperigi en n-ro 1 (1972) de „I. J.“ Post tio la Estraro de TEJA pridiskutos kaj ellaboros la kompletigitan statuton, kiun ni povas voĉdonigi kaj aprobi antaŭ kaj en la nova Jarkunveno de TEJA.

SIMON ĈIKOVANI

(kartvela poeto)  
KIU DIRIS?

Kiu diris, ke malgranda estas  
La patrujo mia, karli kara?  
Ke ĝi kvazaŭ eta disko nestas  
Inter montoj en naturo rara?

Hej, vi metu super roko rokon  
En nebula saŭmo argenta!  
Vi aŭskultu cervan trumpan vokon,  
Ĉe l' temp' flugilon aglan sentu!

La potenc' de la fortikaĵoj  
Per okuloj majstraj vi mezuru;  
Vi kolektu farbojn de l' kreskaĵoj,  
Kiuj brilas de la temp' obskura.

Huraganan vi mezuru venton,  
Kiu muĝas de l' montfaŭk' premita;  
Forton de l' riveroj bolbruantaj,  
Kaj tuŝantaj nubajn montajn pintojn.

Spacon, trairitan de praavoj;  
Tempon de malvenkoj la kruelan,  
Kaj de Gorgasalo\* paŝojn bravajn —  
La respond' al fido de kartveloj.

Per la mano en bata' hardita  
Vi ektuŝis de Derbent\*\* pordegon,  
Kaj ekvidis tiam mirigita  
Senlimecon de l' patruj' grandega

El kartvela Esperantigis  
Ida Lisiĉnik

\* Gorgasalo — la kartvela caro en la V jarcento, fondinto de la urbo Tbilisi — nuna ĉefurbo de Kartvela Respubliko, konata ankaŭ pro siaj venkoj super la multnombraj malamikoj.

\*\* Derbent — la urbo, tra kies pordegoj ĉiam venetradis Kartvelojn la malamikoj. Venkinte la turkojn, Gorgasalo detruis la konstruitajn de ili post unu sia venko triumfan pordegon.

RASIK GAMZATOS

(Dageŝtana poeto)

Ni ĉiuj mortos, senmortec' forestas.  
Ne nova estas tiu homa sort'.  
Sed gravaas — kio post la homo restas —  
Ĉu domo, pado, arbo aŭ vort'.

Ne ĉiuj ja sekigas riveretoj,  
Ne ĉiujn kantojn tempo forgesigas.  
Obligas forton de l' river' fontetoj  
kaj famon nian kantoj eternigas.

Elrusigis Ida Lisiĉnik

### SUKCESO

Kantis mi, laŭdis min la kritik',  
kiel ĉi kantoj ekskuis!  
Ne, nur vaglumoj ja en rememor'  
tristan animon trafuis.

Diris ĝi: Kia memtipo de vers',  
kia potenc' en mi, grando!  
Ne, ne! Nur naskis min en Silezi'  
mort-turmentita hejmlando.

Oni recitis la versojn en Prag',  
homoj aplaŭde fervoris.  
Kial? Ke vivis Maryčka, ke nin  
oni en Frydek strangolis?

Foje, se sub la Beskida montar'  
torĉ' antaŭ Teŝin ekflamus  
kaj la homvicojn en takto de mars'  
mi per la kant' akompanus,  
se vi, ho gento tretita, en jug'  
endormigita giganto,  
tiel komprenus al mia kantar',  
dirus mi: Taŭgis la kanto.

P. Bezruc

### LA REDAKCIO DE „INTERNACIA JURNALISTO“ APERIGOS OPINIOJN KAJ PROPONOJN POR PROJEKTO DE NOVA STATUTO DE TEJA

En la nuna n-ro (3—4) de „Internacia jurnalisto“ ni aperigas la malnovan Statuton kaj la projekto-Statuton de TEJA, proponitan de anglatj teĵanoj en la Londona jarkunveno de nia Asocio.

Ni invatis ĉiujn membrojn de nia Asocio sur la paĝoj de nia organo diri siajn opiniojn kaj proponojn por ŝanĝoj en la Sta-

tuto de TEJA. La proponitajn opiniojn ni aperigos en n-ro 1/1972 de „Int. jurnalisto“. Post tio la Estraro de TEJA, konsiderinte la proponojn, ellaboros la novan Statuton de TEJA, kiun oni voĉdonigos eble en jarkunveno de la Asocio.

Gekolegoj, sendu tuj viajn opiniojn kaj proponojn al la redakcio de „Internacia Jurnalisto“.

## PRI NIA NEUTRALECO

En la kadro de la Londona Kongreso de UEA okazis diskuto pri tiu temo. Ni publikigas la opinionon-diskutkontribuon de Rudi Grätz — germana s-ano — la temo „Neŭtraleco de UEA — ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?“

Neŭtraleco estas ofte diskutata problemo — nocio, tro diversmaniere interpretata, depende de la ideologio de la unuopulo, depende de la politika pozicio de la organizaĵo.

Ni vivas en mondo, kiu konstante ŝanĝiĝas. Ne estas kontestebla, ke ankaŭ la enhavo de la nocio neŭtraleco ŝanĝiĝis kaj plue ŝanĝiĝos. Cetere, laŭ mia opinio, absoluta neŭtraleco ne ekzistas kaj ni ne devas debati pri tiuj problemoj, pri kiuj ni povas esti neŭtralaj kaj pri tiuj, kie objektivite ne eblas neŭtraloco.

Se UEA volas plenumi siajn celojn kaj samtempe gardi universalecon, tiam estus ĝuste, konsideri tre serioze la realecojn de nia aktuala mondo. Tiu ĉi diskuto povas kontribui al la plua konsiliĝo pri tio. Do, oni devas trovi pozicion, kiu respondas al la gravaj taskoj de la homaro.

Mi do opinias, ke UEA ne povas ne havi pozicion pri ĉesigo de aktualaj militoj, pri la gardo de la tutmonda paco, pri malarmado, rasdiskriminacio kaj aliaj problemoj, pri kiuj la Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO ekzemple prenas pozicion. En ĉiu rilato mi ŝatus substreki, ke en la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kiel fcelo estas formulita:

1. „Konsorvi la internaciajn pacojn kaj sekurecon kaj tiucele apliki efikajn kolektivajn rimedojn por preventi kaj forigi minacojn kontraŭ la paco kaj por subpreni ĉian agon de agreso aŭ alian rompon de la paco, kaj realigi, por pacaj metodoj konforme al la principoj de justeco kaj internacia juro, la ĝustigon aŭ la solvon de internaciaj disputoj aŭ de situacioj, kiuj povus konduki al rompo de la paco“.

Ĉu UEA ne plu akcentite povas subteni tiun ĉi celon?

Mi opinias, ke UEA ne bezonas subteni detalajn partipolitikajn starpunktojn, se ĝi subtenas tiun gravan celon de Unuiĝintaj Nacioj. Same UEA povus havi starpunkton ekzemple pri la neceso de konferenco de Eŭropa Sekureco, pri samrajta kunlaboro de ĉiuj ŝtatoj en ĉiuj internaciaj organizaĵoj.

Plue mi opinias, ke UEA ne povas toleri genocidojn sur la tero, inter kies viktimoj ankaŭ estas esperantistoj. En tiu ĉi rilato ni, germanoj, havas amaran historian sperton, se ekzemple ni pensas pri la terura sorto de familianoj de la aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof kaj aliaj famaj esperantistoj. Pri ilia neŭtraleco oni ne demandis, kiam oni murdis ilin.

Konklude mi do opinias, ke internacia organizaĵo, kiel UEA, devas praktiki pozitivan neŭtralecon kaj subteni la principojn de paca kuneckizado inter ŝtatoj de diversaj sociordoj. Ŝajnas al mi, ke kaj en la kongresparoladoj de la prezidanto de UEA, profesoro Lapenna en Vieno kaj tiu en Londono estis akcentite, -ke UEA en la demando milito kaj paco devas preni pozicion.

La pozitiva estonta evoluo de UEA kiel senpartia organizaĵo dependas grandparte de la konkreta alpaŝo al tiu demando.

De tempo al tempo iuj esperantaj kaj ne esperantaj gazetoj aperigas notojn kaj informojn pri nia TEJA, pri „Internacia Journalisto“ aŭ represas materialojn el nia organo. Tion preskaŭ en ĉiu n-ro faras „Ilustrowany Kurier Polski“ en urbo Bydgoszcz, Pollando, kies redaktoro, membro de TEJA, gvidas specialan Esperanto — rubrikon, aperanta en ĉiu numero. La gazeto aperas en pola lingvo.

En sia n-ro 207 „Ilustrowany Kurier Polski“ aperigis artikolon pri nia organo „Internacia Journalisto“ kaj pri TEJA.

„The Worker Esperantist“ — organo de la laboristaj esperantistoj en Anglio en sia n-ro 229 (septembro 1971) reprenis el „Internacia Journalisto“ (n-ro 2) la artikolon de R. T. Sanberg „La redaktarto gravas en la informado“.

## REPRESOJ EL „INTERNACIA JURNALISTO

Al la organo de nia TEJA turnis atenton ankaŭ aliaj Esperanto — kaj nacialingvaj gazetoj.

En n-ro 2—1974 de „Iŝ“ aperis la artikolo de il bulgara ĵurnalisto Ivan Strogov sub la titolo „Kiel oni venkas la lingvan baron en UNO?“ Pro sia interesa enhavo, tuŝanta gravan problemon, la artikolo estis represita aŭ menciita de kelkaj gazetoj.

La menciita artikolo estis represita de la E — gazeto „The Worker Esperantist“, en la septembra n-ro 1971.

La artikolo de Ivan Strogov aperis en rusa lingvo en la ĵurnalo „Kutaiskaja Pravda“ (Kutaisa Vero) n-ro 104,4 sept. 1971 kaj „Molodej Gruzij“ (Junularo de Kartvelio, n-ro 10,16 sept. 1971. Tiu ĉi n-ro de „Molodej Gruzij“ aperis kune (en unu ĵurnalo kun la ĵurnalo „Molodej Azerbajĝana“ (Junularo de Azerbajĝano) kaj „Komsomolec“ — ĉiuj tri organoj de la CK de Komsomolo respektive — de Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio (la lasta — „Komsomolec“).

La artikolo estis represita ankaŭ de la urba ĵurnalo „Kutaisi“, (n-ro 178 de 4 de sept. 1971), kiu aperas en kartvela lingvo.

La tradukojn faris s-ino Ida Lisičnik.

„Hungara Esperantisto“ julio 1971, mencias pri la artikolo „Kiel oni venkas la lingvan barilon en UNO“, citante parton de la artikolo, kiu aperis en n-ro 2,971 de „Int. Journalisto“.

La artikolo estas menciita ankaŭ en la, pollingva ĵurnalo „Ilustrowany Kurier Polski“.



**ARKITEKTURO DE LA ĴURNALO**

**АРХИ  
ТЕКТУРА  
НА  
ВЕСТНИКА**

**Дизайнотъ Проектъ**



Unuavide la arkitekturo de la ĵurnalo estas temo, kiu interesas malvastan rondon de specialistoj, kiuj laboras sur tiu ĉi kampo. Sed se oni atdonas al ili ĉiujn ĵurnalistojn, partoprenantajn rekte en la produktado de la ĵurnalo, la aŭtorojn, kiuj kunlaboras ĉe la redaktado, la laboristojn el la poligrafio, la studentojn pri ĵurnalismo kaj grandan rondon da legantoj, kiuj ne estas indiferentaj al la formigo de la ĵurnalo—la rondo konsiderinde plivastigas. Tion klarigas la rapida transformiĝo de la aperinta antaŭ kvar jaroj libro de Dimitar Georgiev „Arkitekturo de la ĵurnalo“ en bibliografian maloftaĵon. Pro tio kun intereso oni renkontas ankau la duan eldonon de la libro, aperinta antaŭ nelonge en la libroj.

La nuna eldono konsiderinde diferencigas de la unua. Ĝi estas fakte nova, originala, plivastigita pristudo de la historia procedo, nuntempa stato kaj la perspektivo por evoluo de la grafika vizaĝo de la ĵurnalo kaj de la organizado de ĝia produktado. En la libro aperas novaj temoj, kiuj mankas en la unua eldono; pri la teoria fundamento de la ĵurnalo, ĝia disvolviĝo eksterlande kaj ĉe ni (en Bulgario), la organizado de la produktado kaj la laboro de la sekretario, per elektado de la lertipoj, la skemo de la grafika koncepto de unu ĵurnalo, prognozo por disvolviĝo en la proksimaj dudek-tridek jaroj. Krom tio la aŭtoro konatigas nin kun la konceptoj de multaj specialistoj, trovigantaj en la profesia literaturo kaj li mem esprimas sian rilaton al tiuj konceptoj.

La dua eldono de la „Arkitekturo de la ĵurnalo“ diferencigas per analitika pentrado de la grafikiĝ specifecoj de la plej disvastigitaj priformadaj stiloj en la praktiko kaj teorio de la presarto. En la libro oni pritraktas la plej disvastigitajn ĵurnalojn de 25 landoj, estas farita retuvo de la priformado de la bulgara gazetaro ekde ĝia fondiĝo ĝis nun. Kvankam mallonge, aparte enhavoriĉe estas analizitaj la ŝanĝoj en la grafika vizaĝo de niaj bulgaraj ĵurnaloj dum la lastaj 25 jaroj... tempo, en kiu estis prova-taj kaj eksperimentataj ĉiuj fundamentaj manieroj de la nuntempa priformada arsenalo, periodo de pliiĝistigo de la konceptoj kaj la praktiko,

La aŭtoro tuŝas ĉiujn aspektojn de la arkitekturo de la ĵurnalo, donante grandan atenton al iuj gravaj oor la praktiko

demandoj — la stila unueco, la titoloj, la ilustroj, lertipoj, aparte pri ilia elektado lige kun la higienio de la legado. La oportuneco de la legado estas ĉefa kriterio ĉe elektio de la fundamenta teksta lertiparo — tiu penso ne devus esti forgesata de iuj ĵurnalformantoj, kiuj ofte transformas la diverskolorrecon de la ĵurnalo kaj multtipan literaron en memcelon.

La nova eldono de „Arkitekturo de la ĵurnalo“ povas esti taksata kiel fundamenta verko, kiu pritraktas sur larĝa fundamento de esploroj de la historio kaj la nuntempa praktiko la trajtojn kaj tendencojn por disvolviĝo en la formado de la ĵurnalo. Sur la paĝoj de la libro oni sentas la stilon de kompetenta kaj konscia esploristo, kun postulema gusto kaj riĉa sperto de ĵurnalisto — priformanto kaj organizanto, akumuli-taj de multjara praktiko en la redakcioj de la ĉiutagaj ĵurnaloj „Narodna mladef“, „Trud“ kaj „Oteĉestven front“ kiel respondeca sekretario kaj ĉefa vic-redaktoro. Tio faras la libron aparte proksima al la homoj de la priformada laboro, al ĉiu kiu havas intereson al la produktado de la ĵurnalo.

Oni nur povas bedaŭri, ke diference de la unua eldono, la nuna poligrafia presformo de la libro ne respondas al iuj postuloj de la higienio de la legado, pritrakitaj de la aŭtoro en la dediĉita pri tiu celo ĉapitro. Tro malgrandigitaj estas la blankaj margenoj de la paĝoj en iuj lokoj, ne sufiĉas „aero“, ofte la teksto vidiĝas ambaŭflanke de la papero... Ĉio ĉi iom malheligas la gajecon de apero de tiu bela kaj utila libro antaŭ la publiko.

Tradukts: N. Nanov

**INFORMOJ—SCIĜOJ**

**DIPLOMA LABORO EN ESPERANTO**

Esperantistino el urbo Klaipėda Veronika Brujilaite (Veronika Brujilaite) finis ĉi-princltempe en Vilnusia Ŝtata Universitato studojn pri ĵurnalistiko, defendinta diploman laboron je temo „Esperanto kaj la presaro“. La gvidanto de la laboro estis docento J. Bilofa. Fontojn por la studo Veronika Brujilaite trovis en sciencajn bibliotekojn de Vilnius, ankaŭ ĉe kelkaj esperantistoj. La diplomlaboro ampleksas pli ol 80 paĝojn.

**ANONCETO**

Pli ol 70 novaj esperantistoj, membroj de Fo-Ki-Ma — amika rondo ĉe „Orion—Televideo“ deziras korespondi kun samfakaj esperantistoj el la tuta mondo. En la amika rondo estas multaj filatelistoj kaj naturamikoj. Adreso: Esperanto „Ko-Fi-Ma“, amika rondo, Orion televideo, Budapeŝt 10. pf. 84, Hungario

**AL LA ĈEFREDAKTORO DE  
„INTERNACIA JURNALISTO“**

Ivan Esperov

Kara kaj tre estimata k-do Esperov!

Kune kun ĉi letero mi sendas al vi du tiajn lo-kajn ĵurnalojn: „Kutaiskaja Pravda“, kartvelingvan „Kutaisi“ kaj ruslingvan respublikan tre popularan junularan ĵurnalon „Junlaro de Kartvelio“, en kiuj estas presita en mia traduko la artikolo de Ivan Strogov „Kiel oni venkas la lingvan baron en UNO“ („IJ“ N-ro 1. 71).

La artikolo vekis tre granden intereson, kaj mi estas certa, ke nenia alia ĵurnalo rifuzas ĝin publikigi.

Eĉ surstrate min haltigis kelkaj personoj por rakonti kun kio intereso ili legis ĉiun artikolon. Doktoro pri filologiaj sciencoj k-do Samelašvili rakontis al mi, ke lin tre mirigis la ekzisto de Esperantlingva gazeto „Internacia Ĵurnalisto“, kie li legis tian interesan artikolon. Demandinte min ĉu mi abonas tian gazeton, li petis permeson viziti min por konatigi kun ĝi.

Do ni vidas, ke la sola mencio, ke la artikolo estas tradukita el la Esperantlingva gazeto „IJ“, estis tiom efika propagando de Esperanto kaj ĝia preso.

Sed bedarinde sur la paĝoj de „IJ“ ni ne tre ofte renkontas seriozajn artikolojn de diversnaciaj ĵurnalistoj, artikolojn, kiuj prezentus intereson ne nur por esperantistoj kaj pri Esperanta movado, sed kiuj traktus aktualaĵojn problemojn, interesajn por ĉiuj.

„Internacia Ĵurnalisto“! Tiu titolo al multo devigas eĉ per si mem. La organo ne nur de ĵurnalisto, sed de internaciaj ĵurnalistoj! De kiu plu oni povas atendi artikolojn el diversflanka vivo en multaj landoj, pri modernaj problemoj kaj politika situacio en diversaj landoj, kultura vivo, arto, junlara movado, internaciaj okazintaĵoj, precipe materialon, kiu ne estas trovebla en la naciaj ĵurnaloj.

Se el ĉiu lando, kie troviĝas esperantisto-ĵurnalisto, nia gazeto estus ricevinta almenaŭ unu artikolon monatan „IJ“ ne havus rivalojn. Ĝi ja ne suferas pro lingvaj baroj, ĝi ne devas pagi honorarion al siaj kunlaborantoj, ĝi havas realan eblecon havi proprajn korespondantojn el dekoj da landoj. Kial do tio ne okazas? Kial en „IJ“ ni plej ofte trovas materialon nur el Bulgario, Sovet-Unio? Kial silentas la ĵurnalistoj el aliaj landoj?

Ankaŭ en Sovet-Unio troviĝas multe da ĵurnalisto-esperantistoj, poetoj, verkistoj. Sed aktive kunlaboras nur k-doj Danovskij kaj Logvin. Kial? Sed kiom da interesaj okazintaĵoj, unikaj faktoj ili povas rakonti al la eksterlandaj ĵegantoj de „IJ“ — pri la riĉega kaj multkolora krea vivo en nia lando.

Antaŭ la ĵurnalistoj de la tuta mondo kaj ankaŭ de ĉiuj abonantoj de „IJ“ staras la nobla tasko ne nur subteni la gazeton per larĝa abonado sendate regule al ĝia valoran materialon, kiun volonte represus naciaj ĵurnaloj kaj gazetoj, se la artikoloj temos ne nur pri Esperanto. Sed la sola fakto, ke la fonto de tiaj artikoloj estas Esperanta gazeto, estus la plej efika propagando de Esperanto.

Al mi ŝajnas, ke tiu problemo estas nepre diskutinda sur la paĝoj de „Internacia Ĵurnalisto“.

Ida Lisiĉnik

Kutaisi

USSR, Kutaisi  
Puŝkinskaja 5/11

Kara samideano Keremidĉiev,

kvankam iom malfrue, mi gratulu Vinokaze de la honorigo per alta ŝtata ordeno ricevita okaze de Via vivjubileo.

Mi ŝatus skribi al Vi hodiaŭ pri du aferoj:

Jam la 13-an de januaro 1969 mi proponis en la letero sendita al Vi kaj al la prezidanto de TEĴA eldoni bultenon por pliintensigi kontaktojn inter la ĵurnalistoj — ĉefe personaj — kaj kunordigi ilian laboron. (Unusola alvoko iam veninta al mi estis tiu de nia ekssekretario el Podova, Junio 1970, en kiu li skribas pri la regula kontakto kaj postulas „pliefikigon de nia laboro“). Ve, neniam mi ricevis de ti liston almenaŭ de la ĉefaj funkcianoj de la asocio. Kaj eble neniam mi legis ian artikolon en IJ de aliaj estraranoj de TEĴA.

Lige kun la demando unua mi ŝatus instigi la estraron de TEĴA — se ĝi kunsidos en Londono — ke ĝi nepre okupiĝu pri la informado kunkse kun la ĉefismo de la nunjara UK. TEĴA devus lanĉi tiaspecan kampanjon.

Antaŭ nelonge ni komencis dissendadi gazetaran servon de ĈEA al kelkdekoj da gazetoj kaj institucioj — la rezultoj estas kontentigaj. Esperanto-organizaĵoj ni informas precipe pere de STARTO. Esperble vi honorede ricevas ĝin.

T. S. Kopio al s-ono Kun antaŭdankoj samideano  
O. Thormodsen Via O. Kniĉal

Budapest, 10-an de Septembro, 1971

Kara sinjoro Kolego!

Mi estas redaktoro de la speciala ĵurnala bilda mikro-magazino „Stelo de Eŭropo“. Ĝi estas oficiala organo de la Esperanto „fo-ki-ma“ Eŭropa Federacio kaj estas projekciebla sur la blanka muro aŭ ekrano.

La magazinon povas legi multaj personoj, ĉar ĝin oni povas projekcii laŭ plaĉa grandeco.

Mi deziras riĉigi vian ĵurnalon per informoj regule. Mi ĉi kune sendas al vi artikolon pri la uzina magazino, kiu estas la sola en la mondo. Mi petas por la tre valoraj artikolo kun foto malgrandan lokon en via ĵurnala gazeto.

Mi invitas ĉiujn ĵurnalistojn, ke ili nepre bonvolu partopreni en la serioza celo kaj laboro de Esperanto „fo-ki-ma“ Eŭropa Federacio, kies membraro estas kulturaj, sciencaj ĵurnalistoj kaj pedagogoj en 22 eŭropaj landoj. Ili ĉiuj estas kunlaborantoj de junularaj programoj de eŭropaj televido — kaj radiostacioj.

Delegitaro de Esperanto „fo-ki-ma“ Kultura kaj Informa Internacia Instituto funkcias en 118 landoj de la mondo. Nia Instituto havas tri federaciojn: Pacifikan, Oceanan kaj Eŭropan. La prezidantaro plej baldaŭ eldonos glumarkojn en 500.000 folioj. Vi povas vidi ankaŭ la nomon de via „Internacia Ĵurnalisto“.

Anticipan dankon: Pölsöky

## PRI LA KUNLABORADO AL „INTERNACIA JURNALISTO“

En la nuna n-ro de „Int. Journalisto“ ni aperigas la interesan leteron de s-ino Ida Lisičnik el Kutaisi, Kartvela respubliko, USSR. S-ino Lisičnik juste pritraktas la ĝisnunan redaktadon kaj la materialojn, aperantajn en la organo de TEJA. Valoroj estas ankaŭ siaj proponoj por plibonigo kaj pliriĉigo de la materialoj. Ni akceptas kiel pravaj la kritikajn notojn kaj dankas al nia kunlaborantino.

Plurfoje la redakcio de „Ij“ turnis sin al la membroj de TEJA kaj al siaj leantoj kun peto kaj invito al pli konstanta kunlaborado al nia organo. Specialajn invitojn ni direktis al la kolegoj el la okcidentaj landoj. Tiun demandon ni starigis ankaŭ en ĝeneralaj jarkunveno de TEJA. Tamen la rezultoj, kiel konstatas s-ino Lisičnik, ankoraŭ ne estas bonaj.

Profiante la okazon, la redakcio de „Ij“ ree alvokas siajn legantojn al regula kunlaborado. Ni atendas prijurnalistajn, precipe, rilatantajn nian profesion materialojn, krome—utilajn informojn, petojn, sangon de profesia sperto ks.

Al konstanta kunlaborado! „Int. J-sto“ atendas senpacie la rekomenditajn de Lisičnik materialojn kaj aliajn valorajn kontribuojn!

### ESPERANTISTA RENKONTIĜO

dum Foiro en Leipzig (GDR) okazos 11. 3. 1972 en Klubo de la Inteligentularo „Gottfried-Wilhelm-Leibnitz“ 701 Eeipzjg, Elsterstr. 35, je la 19, 30-a horo.

Vizitu la Esperantistojn en Leipzig!

### NIA POŝTO

S-ano Pölöskey, Budapeŝto. — Viajn leterojn ni danke ricevis. La redaktoro Esperov ne partoprenis la UK en Londono, pro tio li ne ricevis vian salutleteron. Ni petas vin: priskribu en mallonga artikolo la celojn de via „jurnalista“ asocio, ĝiajn taskojn. Interese, ĉu via „federacio“ ne povus funkcii kiel sekcio de Tutmonda Esp. Journ. Asocio?

Florian Dez. Paraskivescu, Lupeni, Rumano.—La abonkotizon vi povas pagi al s-no S. Zalmanovici, soseaua Catelu 19-sc. 2. Bukaresti 65, Romano.

### JASNAJA POLJANA LOGAS

La muzeo — bieno de Leo Folstoj „Jasnaja Poljana“ akceptis trilionan vizitanton.

Bileton kun cifero tri kaj ses nuloj ricevis Georgij Aleksejevic Denisov. ĉeto de fako de unu el novosibirskaj uzinoj, granda adoranto de Tolstoj —

### SUBSKIBA KAMPANJO

Universala Esperanto-Asocio nun prenas iniciaton por krei konstantan subskriban kampanjon por Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi estas direktita al parlamentanoj kaj signifaj unuigoj. Per speciala artikolo ĝi priskribas ĝiajn perspektivon kaj bazon. Taskon de komisiito por la kampanjo, akceptis ano Ib Schleicher e I Dantando. Adreso; Ib Schleicher Ved Bellahoj 21.13 DK-2709 Kopenhago BRH Danlando Telefono (01) BE 83 01). Li prenas la centran iniciaton, starigas laborplanon, kontaktas la landajn asociojn kaj aliajn por trovi agantojn, kunlaboros kun ili kaj cetera faros la necesan gvidan kaj administran laboron.

#### AGANTOJ

En ĉiu lando necesas almenaŭ unu kapabla persono por fari la laboron. Plej bone estas, se tiu persono povas turni sin persone al ministroj, parlamentanoj kaj gvidantoj de signifaj unuigoj, — sed ankaŭ eblas fari la tuton skribe. Trovigas laborplano kun kompleta materialo, kiun oni povas traduki. Tio signifas, ke la kampanjo devus esti ebla en preskaŭ ĉiuj landoj, kie entute troviĝas esperantistoj.

Ĉi tiu agado estas vere tre grava kaj urĝa, kaj tial ĉiuj landaj asocioj kaj unuopaj personoj estas insiste petitaj meti grandajn fortojn en ĝin i. a. por trovi en ĉiu lando almenaŭ unu laborkapablan homon, kiu kiel komisiito de la jnda asocio povas esti aganta en la lando.

#### LABORPRANO

La laboro povas okazi sisteme kaj efike, laŭ la speciale elaborita plano, sed kompreneble oni povas, se necese, labori malpli sisteme, ekz. sen kartotekoj. En ĉiuj okazoj estas gravege starti la laboron tiel rapide, kiel eblas.

#### LINGVOJ KAJ BROŝUROJ

Kiel eble plj konsekvence leteroj kaj broŝuroj al la subskribantoj devas esti en la koncerna nacia lingvo. En kelkaj afrikaj kaj aziaj ŝtatoj oni povus esti tentita uzi ekz. angle- aŭ francilingvan broŝuran materialon, ĉar en nacia lingvo ne ekzistas taŭga materialo. Tial s-ano Schleicher klopodos trovi eblecon por produktimalgandajn kvantojn de la broŝuroj en tiuj najciaj lingvoj.

#### FINANCOJ

La dana landa asocio mem pagas ĉiujn kostojn ligitajn al la dana parto de la kampanjo. Tio signifas la kostojn de papero, kovertoj, afranko, broŝuroj ktp.

UEA ne havas eblecon kovri tiajn elspezojn, kaj tial necesas, ke laŭeble la ceteraj landaj asocioj agu same, se la kampanjo ne fariĝu terezure limigita. Espereble multaj trovos elirvojn por agi same kiel en Danlando. Tio sendube konformas al ĉies intereso, ĉar tia konstanta kampanjo estas efike uzebila ankaŭ en la cetera agado de ĉiu landa asocio.

La unuan vicon en la Subskriba kampanjo, kompreneble, prenos journalistoj, kies kapabloj kaj profesiaj ankaŭ la eblecoj permesos al ili eklabori persiste por la efektiviĝo de tiu grava tutesperantista afero.

talento. La gajninto ripozis ĉe Riga antaŭmaro kaj reveninte hejmen, vizitis la muzeon-bienon. Li ricevis memoradreson kaj duvoluman verkaron de Leo Tolstoj.

A. Logvin, Moskvo

# AKTIVA GURNALISTINO

Jurnalisto, kiu vere en la ĉiutaga praktika vivo helpas la Internacian Lingvon Esperanto, estas samideano Eŭa BANHIDI — redaktoro de „ORION UJSAG”. Jam de post 1963 jaro ŝi konstante apogas la internacian Lingvon kaj donas konstantan rubrikon por la disvastigo de la lingvo en la fabriko, kie la laboristaro produktas la mondfamajn televidoaparatojn „ORION”. La produktaĵoj de la firmao estas popularaj en pli ol 80 landoj sur la kvin kontinentoj.

La ĵurnalo komencis publikigi en 1970 jaro esperantan kurson sub titolo: „fo-ki-ma Esperanto-lernejo”. La kurso atingis grandan sukceson kaj en la entrepreno „ORION” en la „mikro-klubo” fondiĝis Esperanto-rondo sub la titolo „fo-ki-ma amika rondo”.

La nova rondo en ĉiu monato dufoje organizas kunvenon en la belega salono „mikro-klubo”. La klubon vizitis la pasintan jaron la HUNGARA TELEVIDO kaj tie la sonbendklubo preĝis bonsukcesan sonbendon sub la titolo „Popolkanta bukedo”. La bonkonatajn hungarajn popolkantojn kantas S-ino Anny Dredor. La mandolino-ensemblo estas la sola opertmuzika ensemblo en la mondo!

Oni povs mendi la sonbendon ĉe „Mandolino-ensemblo „Emeriko Kálmán” ĉe Sindikata Komitato de Orion-Televideo, dirigento S-ro Marcello Reddi Orion, Budapeŝt, 10, poŝtadreso 84.



S-ino  
Eŭa Banhidi

Jurnalisto de la mondo! Bonvolu skribi amase al: Redakcio de Orion Ujĵag, (redaktoro Eŭa Banhidi) Budapeŝt 10, poŝtkesto 84 HUNGARIO

**Adolf Stanu ra**

## SIMBOLOJ DE ESPERANTISMO

### I NIA INSIGNO

(Fragmentoĵ el leterojĵ)

Varsovio, la 8-an de majo 1890.  
Kara Karlo,

Multe mi meditis pri tio, kiel propagandi nian karan lingvon. Kaj antaŭ kelkaj semajnoj mi ricevis leteron de mia amiko kaj iana samklasano. Li loĝas en Krakovo. Jam de tre longe ni ne vidis unu la alian kaj ankaŭ ni ne korespondis. Li deziris, ke mi plenumu ian komision por li ĉi tie en Varsovio, sed li ne estis certa, ĉu lia letero trovos min laŭ la adreso, al li konata. Por ke lia letero povu eventuale reveni al li, li signis ĝin per sia stampo, kiam li uzadas ordinare en sia metiejo, kiam li preĝigas kvitancojn por pagitaj sumoj. Kaj sur tiu ĉi stampo, sub lia nomo, mi legas la vorton „horlogisto.” Do, nun venis al mi la penso: Ĉu mi ne povus havigi al mi stampilon kun vorto „Esperantisto”? Mi faris tion, por ke mi propagandu

pli bone nian karan Esperanton. Kion vi pensas pri tio? Kiel plaĉas al vi la stampo, kiun vi povas vidi sur la koverto de tiu ĉi letero? Skribu al mi pri tio.

Kun koraj salutoĵ via varsovia amiko,

Johano.

\*\*\*  
Nürnberg, la 15-an de majo 1890

Kara amiko,

Via penso pri la vorto „Esperantisto” en la stampo estas bona. Nur mi pensas, ke multaj homoj, kiuj ne estas esperantistoj, demandas: Kian metion havas tiu homo? Kaj oni devos klarigi al ili, ke tio ne estas metio, sed ke vi parolas internacian lingvon ktp. . . Sed, tamen bone. Tio estos tempo por konversaci pri Esperanto. Cetere, unu mia amiko ĉi tiea prestigis al si vizitkartojn simile aranĝitajn.

Ankaŭ mi volas propagandi Esperanton simile. Tial mi havigis al mi stampilon kun vortoĵ „Internacia Lingvo Esperanto,” kion vi certe jam vidis, kiam vi prenis en la manon mian leteron. . . . .

Via germana amiko,

Karlo.

\*\*\*

(Post tri jaroĵ.)

Varsovio, la 2-an de junio 1893.

Kara amiko Karlo,

Jam antaŭ tri jaroĵ mi komencis uzadi stampilon kun mia nomo kaj vorto „Esperantisto.” Dum tiuj tri jaroĵ ofte mi pensis pri tio, kiel oni povus aranĝi, ke ni esperantistoj, ekkonu unu la alian en fremda lando, kiam ni renkontas nin. Kaj jen mi legis en „La Esperantisto” pri la propono de sveda samideano B. G. Jonson

Laŭ invito de estona amiko-esperantisto J. Nigols, s-ano Minko Conkovski gastis tri semajnojn en urbo Tallinn, Soveta Estonio. Li vizitis tri kunvenojn de la tre aktiva Tallinna esperanto-grupo. S-ano Conkovski estis invitita de la prezidanto de la grupo J. Ojalo doni intervjuon antaŭ radio Tallinn okaze de la 27-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario pri la ekonomia prospero de lia lando post la revolucio kaj pri la Esperanto-movado en Bulgario. La intervjuo estis disaŭdigita en la 17-a de septembro j. k.

Krom Tallinn s-ano Conkovski vizitis Leningradon kaj Kievon, kie li renkontiĝis kun geesperantistoj. Lia impresio estas, ke la Esperanto-movado en Sovetunio, precipe en Baltaj landoj, estas tre aktiva.

### PERESPERANTA INTERVJUO

Dank' al la klopodoj de nia kolego O. Knichal, redaktoro, en Praga gazeto, aperis intervjuo donita de nia fama kolego — vjetnama jurnalistoj kaj diplomato—Nguyen van Kinh, titolita „Ni atendas vian helpon“

Aperis la tria eldono de la bone konata Seslingva Faldfolio, kies vera titolo estas: „La Internacia Lingvo Esperanto“. La ses lingvoj estas ĉi-foje la angla, araba, franca, germana, hispana kaj rusa. La sama teksto en tiuj ses lingvoj rakontas ĉiujn bazajn faktojn pri Esperanto: pri ĝia strukturo, vortaro kaj fakaj terminaroj, literaturo, gazetaro, radio-elsendoj, kongresoj, organizaĵoj, rilatoj kun Unesko ktp. Sur ĵa lasta paĝo de la faldfolio (formato faldita: 10××23 cm) staras 70 adresoj en 68 landoj, ĉe kiuj la interesitoj povas peti informojn pri Esperanto. Sur la fronta paĝo la titolaj vortoj ŝvebas sur blua fono inter du terglomboj fotitaj el la kosmo.

La faldfolion eldonis Universala Esperanto-Asocio. De la unua kaj dua eldonoj jam vendiĝis pli ol 50 000 ekzempleroj. La nova eldono estas presita en 25 000 ekzempleroj kaj estas vendata je la produkto-prezo, t. e. po 0,08 gld. La inkluzivo de la araba lingvo (anstataŭ la japana) respegulas ĉa kreskantan atenton de UEA al la arabaj landoj, kie la perspektivoj por Esperanto estas multe pli favoraj de post la apero de la Nobla Korano en Esperanto kaj de la novaj lernolibroj kaj vortaro por araboj.

### ANONCO

Seriozajn korespondanconojn por senpaga publikigo akceptos O. Knichal, red. de STARTO, organo de Ĉeĥa E-Asocio, Praha 2, p. k. 8, Ĉeĥoslovakio.

el Östersund, ke ni povus portadi peceton da silko sur la surtuta kolumo, kie ĝi estas bone videbla. Mi pensas, ke tiu ĉi penso estas bona, kaj krome mi pensas, ke la silketo povus havi ĉiam la saman koloron, pri kiu povus interkonsentiĝi la esperantistoj, ĉu jes?

Antaŭ kelkaj tagoj vizitis nian urbon unu samideano el Berlino. Ni estis surprizitaj, kiam li montris al ni malgrandan metalan kvadraton kun ora vorto „Esperanto“ ĉe la teneto de sia poŝhorloĝo. Li rakontis al ni pri sia amiko, kiu portas similan pendaĵon, malgrandan, ĉe sia nazumo!

Amike via,

Johano.

\*\*\*

Varsovio, la 19-an de septembro 1893.

Kara Karlo,

Mi eksciis interesan aferon de mia amiko. Li rakontis, ke nia Majstro (kiun mi vidas nur iam hazarde) decidis, ke li eldonados ĉiujn siajn librojn nur kun verda kovrilo, ĉar la verda koloro estas la koloro de la espero. Oni diras, ke irlanda esperantisto, s-ro Geoghegan menciis al la Majstro, ke la verda estas la ko-

loro de lia patraĵo. Kaj nia Majstro diris al si, ke ĝi povus fariĝi ankaŭ koloro de esperantistoj. . . .

Kun amikaj salutoj,

Johano.

\*\*\*

Nürnberg, la 1-an de oktobro 1893.

Kara amiko Johano,

. . . .

Viaj informoj, kiel esperantistoj povus pli bone atentigi la publikon pri nia lingvo, se ili uzadus samspecajn atentigojn, estas tre interesaj.

Jam antaŭe mi legis en „La Esperantisto“, ke franca samideano Louis de Beaufront proponas: ke ĉiuj Esperantaj libroj havu verdan kovrilon kaj ke oni presu stelon sur ĝi.

En Francio jam aperis lerno-libro, sur kies kovrilo estas presita la kvinpinta stelo. Mi pensas, ke tio estas bela ideo, ĉar ĉiu pinto signifas unu mondparton. Kaj Esperanto estos parolata en ĉiuj mondpartoj, ĉu ne? Mi decidis, ke mi mendu por mi stampilon kun tia stelo kaj kun vorto „Esperanto.“ Per ĝi mi stampos ĉiujn miajn leterojn kaj poŝtkartojn. . . .

Amike vin salutas,

Karlo.

\*\*\*

Varsovio, la 8-an de oktobro 1893.

Kara amiko,

antaŭ kelkaj tagoj mi havis la okazon, legi interesan leteron de samideano Rjabinin. Li proponas, ke ĉiu esperantisto portadu malgrandan verdan metalan rondeton 2—3 cm larĝan kun kvinpinta stelo en la mezo.

Kun koraj salutoj,

via amiko Johano.

\*\*\*

Nürnberg, la 20-an de oktobro 1893.

Kara Johano,

Jam mi sciis pri la propono de s-ano Rjabinin, ĉar mi legis ĝin en nia gazeto „La Esperantisto,“ kies redaktoro, s-ron Christian Schmidt, mi konas bone. Li estas prezidanto de nia mondlingva societo.

Sed mi legis informon, kiun vi bele pretervidis ankaŭ. S-ro P. Deullin proponis, ke oni akceptu verdan stelon el kia ajn ŝtofo kiel insignon de esperantistoj.

Mi sendas al vi korajn salutojn. Karlo.

— „Mi estas Pelé“ — aŭtobiografia lukse eldonita libro de la mond fama „Futbal-Reĝo“ Pele (Edson Arantes do Nascimento) — 130 paĝa. Aldone 46 paĝoj kun artikoloj kaj multaj fotoj pri Pelé, kun belaspektaj kovrilpaĝoj. Eldono de Brazila Esperanto-Kooperativo, Rio-de Janeiro, Brazilo.


— La Pacaktivulo — informilo por komitatanoj kaj aktivuloj de MEM (Mondpaca Esperanto-Movado) aperigas materialojn en n-ro 88/971 pri la okazinta Asambleo de Tutmonda packonsilantaro en Budapeŝto kaj pri la forpasinta eminenta soveta esperantisto prof. Evgenij Alekseviĉ Bokarev k. a. Adreso: Nikola Aleksiev, biv. Hristo Botev 97, Sofia 3 Bulgario.

— La eldonagado de eldonejo — reklamofolio 4-paĝa pri eldonitaj Esperanto-libroj, ilustrita. Eldonis: Eldonejo TK. Box 11, DK-2850 Naerum, Danlando.

— Esperanto in FN — broŝuro 18-paĝa kun kovrilpaĝoj, ilustrita, en dana lingvo.

— Aktuelte en Esperanto — broŝuro 14-paĝa, ilustrita, en dana lingvo. Ambaŭ broŝuroj entenas mallongajn priesperantajn materialojn.

— Sileziaj Kantoj — poemaro de la eminenta ĉeĥoslovaka poeto Bezruč, kies 100-jaran jubileon oni festis pere de UNESKO T.



Sen vortoj

— Ĉeĥoslovensko-Zdiar — bone ilustrita prospekto-broŝuro kun aldona Esperanta bruŝureto — 16 paĝa. Enhavas faktojn kaj informojn pri la pitoreska vilaĝo Zdiar, situanta en la belaj Tatroj, ĈSR.

Arabaj maksimumoj de sepa jarcento kaj aliaj diversaj maksimumoj de imamo Ali kaj aliaj aŭtoroj. El araba esperantigis Husen Al Amili. Paĝoj 80—eldonis la Araba Esperanto-Instituto, Bagdad 1967.

— Ĉu vi scias?, 8-paĝa broŝureto kun dudek bazaj faktoj pri la Palestina problemo de d-ro Fayer A Sayegh. Tradukis Al Amili. Eldonita en Bejrut, Libano, 1967.

— Adiaŭ, Sshewerin; La kvar Ventoj, k. a. versaĵoj, rakontoj, sentencoj, skribitaj en E. aŭ tradukitaj el la araba lingvo de la araba s-ano Husen Al AMILL.

Varsovio, la 10-an de novembro 1898.  
Kara Karlo,

Mi konsentas, ke ĉiuj esperantistoj havu la verdan kvinpintan stelon kiel sian insignon. Tial mi mendis por mi stampilon kun tia stelo kaj mi uzados verdan inkon. Mi pensas, ke estus tre utile, se iu komercisto prestigus sur granda kvanto da leterkovertoj kaj paperoj belgustan kvinpintan verdan stelon kun vorto „Esperanto“.

Via amiko,  
Johano.

[Post unu jaro].  
Nürnberg, la 20-an de novembro 1894.

Kara Johano,  
Jam longe ni propagandas nian lingvon per verda kvinpinta stelo. Sed, ĉu vi legis en „La Esperantisto“? Iu s-ino Prohoroviĉ el via lando proponas, ke ĉiu esperantisto portu oran stelon, ĉu el origita bronzo, ĉu el origita aluminio. Kaj ŝi ofertas, ke ŝi live-

ros tiajn stelojn, el bronzo po 1 rublo, el oro po 8 rubloj.

Mi ne komprenas, kial ni, esperantistoj, ne povas unuigi, ja ni estas samideanoj! Mi estas konvinkita, ke kvinpinta stelo verdkolora plej bone kunigas en si la ideon, kian havis nia Majstro, kiam li kreis nian lingvon. Kion vi pensas pri tio, kara amiko?

Korajn salutojn mi sendas al vi. Via,

Karlo.  
(Post plua jaro).  
Varsovio, la 18-an de junio 1895.

Kara Karlo,

Imagu, ke mi ricevis de mia amiko el Moskvo leteron, en verda koverto, kaj kun surprisita oro stelo kaj surskribo: Lingvo internacia Esperanto. Ĉi plaĉas al mi. Tiujn kovertojn eldonis la Odessa Rondeto Esperantista. Sed kiel vi, ankaŭ mi estas certa, ke la plej konvena koloro por la stelo estas la verda. Tamen, sur

libroj ĝi estas presata nigre, sur kovertoj ore, ĉu ne esperantistoj povas supoz, ke tiaj diverskoloraj steloj havas ion komunan?

Tre amike vin salutas,  
Johano.

Kaj tiel plu, neunuece, iris la afero de nia insigno. Ankorau dum la kunveno en Calais kaj Dover, en aŭgusto 1904, s-ro Pourcine proponis, ke esperantistoj havu ian komunan insignon. Do, evidente, ĝi ne ekzistis ankoraŭ.

Kaj oni iel forgesis la laman proponon de s-ro Deullin, ĉar d-ro Zamenhof skribis en sia letero, publikigita en „The British Esperantist“ en la jaro 1912: „... Poste per asociado de la ideoj (t. e. verda koloro plus stelo — rim. de la aŭtoro) aperis stelo kun verda koloro.“

Sed mi pensas, ke la definitiva formo donis al nia insigno tio, kio okazis en julio 1905 en Boulogne sur Mer.

(Sekvas pri la standardo kaj la himno)

En julio de 1972 estos organizitaj

ESPERANTO — SEMAJNOJ

en tri diversaj partoj de nia lando

1. BUDAPEST,

la "perlo de Danubo" prezentos al Vi la hungaran kulturon en la kadro de HUNGARA KULTUR-FESTIVALO sub aŭspicio de UEA (17—23 julio 1972)

En la programo ni prezentos menciindajn verkojn de nia klasika kaj moderna arto kaj literaturo. Krom la arta programo ni organizos viziton de la urbo, ekspoziciojn kaj ekskursojn.

Ni zorgos pri ejoj por fakkunsidoj laŭ dezire.

Provizora programo de la Kultur-Festivalo:

1. Solenaj arangoj:

- Inaŭguro
- Ferma kunsido

2. Kulturaj programoj:

- Prezento de l'hungara literaturo — poezio kaj prozo
- La hungara muziko
- Kanto kaj horoj
- Folklor-prezentado
- Film prezentadoj

3. Servoj:

- Logiga Servo
- Ekskursiva Servo
- Vizito de muzeoj, art - ekspozicioj
- Diversaj fakkunsidoj

Loko: Ĉefurba Kultur - Domo, Budapeŝt, XI.

Dato: 17—23 julio, lundo-dimanco

Aligkoto: 240.— forintoj aŭ 33 svissaj frankoj

Detalan informon petu de la organizanto:

HUNGARA ESPERANTO ASOCIO,  
BUDAPEST 5. Poŝtflako 193.

2. GYULA,

la ban-kaj ĝardenurbo, situanta 200 km-ojn sudoriente de Budapeŝt-arangos la 10-an Jubilean Sesion de

SOMERA ESPERANTO UNIVERSITATO (10—16 julio 1972)

La pasintajn jarojn karakterizis altnivelaj, interesaj kultursciencaj prelegoj. Inter la prelegintoj ni povis saluti Prof. d-ron Ivo Lapenna, Imre Ungar, d-ron Werner Bormann, Asen Grigorov kaj aliajn eminentulojn de la Esperanto-movado.

La antaŭtagmezajn prelegojn kompletigos la posttagmeza ripozo sur la strando, banejo aŭ ekster la urbo. La Jubilea Sesio inde memoros la unuan dekjaran periodon.

Detalan informon petu de

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO,  
GYULA, 48-as u. 11.

3. ABALIGET,

malgranda vilaĝo, situas 200 km-ojn sudokcidente de Budapeŝt, sur la deklivoj de nia plej bela montaro Meĉek.

Pri via bonfarto zorgas la organizantoj de la 5-A Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj — Naturamikoj (IREN)

Ĉiujare kreskas la nombro de la partoprenantoj de IREN. Kiu foje vizitis nin, neniam forgesas la agrablajn tagojn, pasigitajn en belega naturo, en vera internacia atmosfero.

La partoprenantoj vivas komforte, ripozas, promenas, ekskursas, partoprenas la amuzajn programojn aŭ vizitas la proksime situantan belan urbon PECS, plena de art-historiaj dokumentoj.

Detalan informon petu de  
HEA 3-a Teritoria Komitato, Pecs 1. Poŝtflako 2.

ATENTU!

Ĉiuj tri arangaĵoj laŭ administrado estas memstaraj, do oni devas aligi aparte al la arangaĵoj laŭ la adresoj en Budapeŝt, Gyula, respektive Abaliget.

Ni petas ĉiujn kiel eble plej frue aligi, ĉar la nombron de partoprenantoj versajne ni devos limigi.

*TEĴA — anoĵ! Tuj sendu viajn proponojn kaj opiniojn pri la statuto de TEĴA al la redakcio de „I. J.“!*

# ESPERANTO FO·KI·MA

FO-KI-MA BILDA ADRESSCIO

aperos en 1972 dufoje monate kun 16 bildoj de la anoncintoj, kiuj sendas al la redakcio du fotojn kun 20 vortoj. La anoncotizo estas tri internaciaj kuponoj. La bildoj devas esti 3x4 cm.

Adreso: Fo-Ki-Ma-bilda adresaro, "Budapest, P. O. 119, poŝtfolio 16, Hungario.

## GRAVA INFORMO

Kiel aparta eldono de „Fo-ki-Ma” — Mikromagazino, la 20-an de septembro aperis speciala ĵurnalista bilda projekciebla magazino „Stelo de Eŭropo”. Ĝi estas oficiala informilo de la „Eŭropa Fo-Ki-Ma” Esperanto-Federacio (Parizo). Ĝi estas unuiĝo de la ĵurnalistoj kaj radio-televido-raportistoj en 22 eŭropaj landoj.

Ĉu vi pagis vian membro-aŭ abonkotizon? Se ne bonvolu tuj fari tion! Sendu al monon al la redakcio de „Internacia Ĵurnalisto” aŭ la via landa reprezentanto de TEJA!

## LA MONDA REKORDO DE ĴURNALISTO — STANGISTO

Ja 12-an de oktobro ĵurnalo „Soveta Sporto” ko munikis, ke la ĵurnalisto Adamo Hnatov el Ukraina urbo Lvov plibonigis sian mondan rekordon, levinte stangon je 116 kg.

Ĉi tiun atingon la soveta sportisto — atleto montris dum sportaj konkursoj, kiuj estis en Göteborg, okaze de la 350-jara jubileo de tiu ĉi sveda urbo.

A. L.

*Al ĉiuj membroj de TEJA, al la legantoj kaj abonantoj de nia kara organo — la redakcio de „Internacia Ĵurnalisto” bondeziras sanon, ĝojon, feliĉcon kaj sukceson en ilia poresperanta kaj porpaca laboro okaze de la Nova 1972 jaro!*

## KOREKTO

Kelkaj abonantoj de „IJ” petis nin, ke ni sandu al ili la n-rojn 2 de int j-sto”. Ni avertas aiujn legantojn de nia organo ke la cifero 3 (anstataŭ 2 — kiel estas korekte) de la organo sur la unua paĝo de „IJ” estas srare metita de la teknikas korektistoj de la presaĵo. Oni korektu: 2, 1971. anstataŭ 3. Ni petas pardonon.

## ĈEĤOSLOVAKA RENKONTIĜO

Fine de septembro pli ol 300 ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj kaj gastoj el 7 landoj kunvenis en la moravia urbeto Vsetín. Altnivelan entreprenon aranĝis la loka ER sub la gvido de s-ano A. Berka. Okazis kunvenoj de ambaŭ naciaj E-organizajoj ĈEA kaj AE SSR, kunsidoj de fakaj asocioj (teknika, medicinista, fervojista, IKUE+KELI kaj fonda kunveno de informa sekcio), recita kaj oratora konkursoj. Al la valora kultura programo kontribuis grandparte la urba virina kantoro, laŭreato de Ŝtatpremio, folkloro grupo „Jasenka” k. a. La lastan tagon oni ekskursis tra Valaĥio, la ĉirkaŭa regiono, kiun priskribas ankaŭ la belaspekta broŝuro en E-o porokaze eldonita de ER Vsetín.

## Forpasis

Karol Fielding

en Bristol, Anglio la 20-an de oktobro. Redaktoro de la „Verdstela Bulteno.”

Forpasis en Kiev USSR, la 7-an de novembro unu el la plej malnovaj esperantistoj sovetiaj

Panasi P. Vasilĉenko

en sia 75-a vivojaro.

## MALJUSTECO

Riproĉe diras mondlingvanoj  
Pri la novgajaj ŝtortinganoj —  
Por paco luktis nia frato —  
Kaj Brandt — Nobela laŭreato!  
Aleksandr Logvin

\* \* \*

Al Esperanto-amikoj por la 1972

En la venonta Nova Jaro —

La pacon al vi sub stelaro:

Kaj plej valoran vivtrezoron —

La sanon kaj ia bonhumoron!

Mi povus esti pli riĉe — tosta,

Sed, ve, konjak' tre multekosta . . .

Salutas en la ajna lok' vin

Amiko Via

A. P. Logvin

Ĉefredaktoro: Ivan Keremidĉiev — Esperov, bulv. Hristo Botev 98

Sofia 2, Bulgario, tel. 83-34-04

Redakta komitato: Rajna Konstantinova, Minko Conkovski